# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo aprilo 2013**


## IBERIA RENKONTIĜO

Kiel ni komentis en pasintaj numeroj, inter la 15-a kaj la 17-a de marto disvolviĝis en junulargastejo *San Fermín* de Madrido, la Iberia Renkontiĝo organizita de Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS). Partoprenis ĉ. kvindeko da homoj kiuj povis ĝui tre diverstemajn programerojn, distrajn, klerigajn kaj amuzajn.

Dum la nokto de la sabato, la ĉeestantoj partoprenis viziton sekvantan la paŝojn de la literatura rolulo Max Estrella de *"Luces de Bohemia"* (*Lumoj de Bohemio*) de Valle-Inclán, gviditan de Miguel Fernández. Oni haltis ankaŭ por deklami, kaj je la fino, en drinkejo *Bar Kunin* por ni rezervita, oni ludis pecon de la verko, kaj oni kantis pecojn en Esperanto.

## BITOTEKO EN EUROPEANA

Ekde la pasinta 15a de marto 2013 eblas trovi dokumentojn el Bitoteko, la cifereca biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio, en *Europeana* http://www.europeana.eu/.

Europeana estas projekto de la Eŭropa Unio por krei publikan eŭropan bitotekon konsistantan el bibliotekaj, muzeaj kaj arĥivaj dokumentoj, oficiale lanĉita la 20an de novembro 2008. Ĝi celas doni aliron al la kultura kaj scienca eŭropa heredaĵo kaj estas unika alirpunkto al pli ol 19 milionoj da specimenoj (libroj, pentraĵoj, filmoj, sonregistraĵoj, muzeaĵoj kaj arkivaj dokumentoj) bitigitaj tra Eŭropo.

En septembro 2012 HEF subskribis interkonsenton kun la Ministerio pri Edukado, Kulturo kaj Sporto por reguligi la provizon de la datenoj de sia Bitoteko pere de *Hispana*, la ministeria projekto celanta arigi la hispanajn bitkolektojn de arĥivoj, bibliotekoj kaj muzeoj. La novaĵo pri la aliĝo de Bitoteko al Europeana estis publike anoncita la 15an de decembro 2012 kadre de la Simpozio pri la valoro de Esperanto kiel interkultura fenomeno, organizita de Madrida Esperanto-Liceo, kvankam la fina apero iom prokrastiĝis pro teknikaj kialoj.

Bitoteko alportas al Europeana metadatenojn de dokumentoj ne nur el sia propra kolekto, sed ankaŭ el kolektoj de aliaj organizaĵoj, inter kiuj MEL. Nuntempe, Bitoteko enhavas pli ol 2400 dokumentojn.

La fakto ke Bitoteko troviĝas en Europeana gravas ĉar ĝi integriĝis en reto kiu ebligas strukturi la sciojn pri Esperanto kaj plifaciligi la esploron de ĉiuj interesitoj pri la esperantaj lingvo kaj kulturo. Cetere, tio ampleksigas la videblecon de nia kulturo kaj prezentas nian lingvon rolanta je la sama nivelo kaj por la samaj celoj kiel la ceteraj prestiĝaj kultur-lingvoj.

La adreso de Bitoteko troviĝas en: http://bitoteko.esperanto.es/

## HISPANA KONGRESO

Oni jam publikigis la preskaŭ definitivan programon de la 72-a Hispana Kongreso, kiu disvolviĝos en Zaragozo inter la 3-a kaj 5-a de majo. Ĝi troviĝas en la retejo https://sites.google.com/site/zaragozafrateco/2013-hek/provizora-progra

La baza sidejo de la kongreso estos salono en hotelo (nome: Hotel Goya), kies adreso situas en strato "5 de marzo", numero 5, je la centro de la urbo, apud Plaza de España kaj Avenida Independencia. Por la muzikaj programeroj estas antaŭvidata la uzo de aliaj sidejoj. Oni krome vizitos ĉefajn turismajn vidindaĵojn de la urbo Zaragozo, inter kiuj Aljafería kaj Baziliko.

En la Kongreso funkcios Libroservo kaj eblos spektado de filmetoj kun subtekstoj en Esperanto.

## SAT-KONGRESO

Pretas ankaŭ la provizora programo de la 86a kongreso de SAT, okazonta de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2013 en Madrido. Krom la matenaj Ĝeneralaj Kunsidoj de SAT, malfermaj al ĉiuj kongresanoj, posttagmeze, kaj foje vespere, okazos klerigaj programeroj kaj socipolitikaj debatoj. Vespere ĉefe okazos la distraj programeroj: koncertoj, teatraĵoj ktp.

Jam anonciĝis ĉefaj prelegoj kaj atelieroj. Krom la ĉeesto de aktivuloj ligitaj al la hispana kaj al la SAT-movado, indas mencii la partoprenon de du neesperantistaj aktivuloj, kiuj tamen prezentos siajn tekstojn en Esperanto: Félix Rodrigo Mora prelegos pri "Sociaj movadoj: evoluo kaj perspektivoj. Vojo al la Integra Revolucio" kaj Prado Esteban pri "Virinoj kaj Revolucio".

Eldonado estis ĉiam preciza aktivado de SAT. Tial oni prezentos dum la kongreso imponan verkon fare de Miguel Fernández nome "Poezio: armilo ŝargita per futuro". Tio utilos kiel alproksimigo de niaj eksterlandaj samideanoj al la hispana engaĝiĝinta literaturo.

Tuttaga ekskurso okazos al Toledo kaj duontagaj promenadoj okazos tra Madrido. Dum Postkongreso la 5-an de aŭgusto oni vojaĝos... al la Mezepoko, nome celo de la vojaĝo estos koni la lokojn ligitajn al la tiel nomata *"concejo abierto"* (malferma konsilio) kaj la forua leĝaro, la komunuma reĝimo, la interhelpaj sistemoj, la popola romanika arto, kaj la historian kadron ene de kiu ĉio-ĉi disvolviĝas, proksime al Madrido. La postajn tagojn oni vizitos Segovion kaj Avilon.

Eblas trovi pli ampleksan kaj detalan informaron pri la kongreso (aliĝiloj, listo de aliĝintoj, loĝejo, kiel alveni, fotoj ktp.) en la oficiala retejo http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html

Dum la kongreso eblos ĝui la ekspozicion kiun pretigis la sindikato Confederación General del Trabajo (CGT). Post sia unua prezento en Burgoso, pri kiu ni informis en pasintaj numeroj, ĝi estis jam montrita en la distrikto Baix Llobregat, konkrete en Cornellà kaj en Sant Boi, kaj en marto en la eŭska urbo Rentería / Errenteria.

## VIZITIS NIN

La 22-an de marto vizitis Madridon kaj kunvenis kun lokaj esperantistoj nia zaragoza amiko kaj elstara verkisto Antonio Marco Botella.

## OMAĜO AL EDUARDO LARROUY

La 9-an de marto,nia bilbaa amiko Eduardo Larrouy fariĝis 100-jara. Multnombraj bondeziroj alvenis al li kaj la loka grupo el la tuta mondo.

La grupo de Bilbao organizis por li omaĝon en restoracio la 23-an de marto, kun partopreno de amikoj de diversaj partoj de Hispanio kaj aliaj eŭropaj landoj. La 18-an de marto, la ĵurnalo "Deia" dediĉis al li longan artikolon kun la titolo "Un esperantista centenario". Ĝi alireblas rete ĉe http://www.deia.com/2013/03/18/bizkaia/un-esperantista-centenario

## VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º.

La ĉimonata sabata babilrondo okazos la 6-an de aprilo, kiel kutime en la VIP'S de la "Kuboplaco", je la 17.30.

Novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, kaj en retejo http://www.esperanto.es/mel.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com